

Jarkvino de la Oktobra Revolucio

Centra Komitato de Sovetlanda Esperantista Unuiĝo

Moskvo; RUS 1923

Signatur: 701295-B

Barcode: +Z126338808

Umfang: Bild 1 - 88

Nutzungsbedingungen


Die Österreichische Nationalbibliothek macht an diesen Inhalten kein eigenes urheberrechtliches Verwertungsrecht geltend. Sie erklärt sich insofern auch mit einer Nachnutzung dieser Inhalte in der abrufbaren Qualität ausdrücklich einverstanden. Dies gilt auch für die Verwendung dieser Inhalte in Online-Foren, Blogs und in Social-Media-Kanälen wie Facebook, Instagram, Pinterest etc.. Unabhängig davon sind allenfalls bestehende Rechte Dritter an den Inhalten vor jeglicher Nachnutzung vom Verwender individuell zu klären.

Bei einer Nutzung unserer Inhalte ersuchen wir um die Angabe eines Bildnachweises (Titel, Datierung und weitere verfügbare Beschreibungen) und um eine Quellenangabe (Zitierlink aus [Portal] und der Verweis "[Portal]/Österreichische Nationalbibliothek"). Für Postings auf Facebook oder Instagram ersuchen wir um Verlinkung des entsprechenden Accounts der Österreichischen Nationalbibliothek.

ÖSTERREICHISCHE
NATIONALBIBLIOTHEK

701295-B

• Esp-



ÖNB




+Z126338808

LA
KVINJARO
DE
SOVETLANDOJ



~ ELDONO ~
de
CENTRA KOMITATO
de
*Sovetlanda
Esperantista
UNUIĜO*





Proletarioj de la mondo, unuiĝu!

L. SOSNOVSKI.

Donaco de

N. Hohlov

Marjino
Moskva 1c, U.S.S.R.

Н. И. Хохло́в

Марьино, 28, Москва 18.

Jarkvino de la Oktobra Revolucio.

Kun permeso de l'aŭtoro kaj eldonejo

„RUĜA NOVO“

tradukis el rusa lingvo

V. POLAKOV.

Antaŭparolo de E. DREZEN.

La tuta profito de la eldono estos transdonata al la Tutruslanda
Komisiono por likvido de la malsatosekvoj.

Eldono de Centra Komitato de Sovetlanda Esperantista Unuiĝo.

Moskvo, B. Dmitrovka, 12.

1923.

701295-B


Glavlit. № 6827. Moskvo.

Eldonkv. 4.000 ekz.

„Mospoligraf“. 1-a Modela presejo de, Pjatickaja, 71.




Batalo.



Monumento de la libero en Moskvo.




K-do Lenin oratoras sur la Ruĝa Placo apud la Kremlaj muregoj.




Dum la tagoj de 16—18 julio 1917 en Petrogrado.



Apud Smolni en Oktobro 1917.



La taçmentoj de Ruĝa gvardio en Petrogrado 1918.



La enirejo de Smolni en Oktobro 1917.



J. M. Sverdlov.

Unua Prezidinto de Tutruslanda Ekzekutiva
Komitato de Sovetoj († 1919).



Alfiksado de la memortabulo dum la unua oktobra datreveno
la 7—XI—1918 ĉe la Kremla murego apud la tombojn de la
revolucianoj mortigitaj.



S. ROOS.

Viktimoj.

ANTAŬPAROLO.

Pasis kvinjaro de Sovetlanda ekzisto. Novaj neforigeblaj paĝoj estas enskribitaj en la tuthomaran historion.

Dum kvin jaroj daŭris seninterrompa batalo, lukto kontraŭ malamikoj ĉiaspecaj, kontraŭ la blankaj armeoj kaj la fremdlandaj ekspediciaj taĉmentoj, kontraŭ la rezisto de la burĝa medio kaj la naturo mem.

Invadoj kaj ribeloj, detruo de la popolmastrumado, kaj malsato...

Ĉion plej malfavoran spertis la Sovetlandoj dum tiuj kvin jaroj de sia naskiĝo, kreskado kaj plifortiĝo.

Kaj venkinte ĉiujn malamikojn plej trudemajn, dum la novembro 1922 la Sovetlandoj festis kvinjaron de sia ekzisto.

Longa ankoraŭ estas la vojo trapasota, daŭre ankoraŭ necesos batali por veni al la fina venko.

La liberigo de la ekspluatata homaro, komencita en Ruslando, povos finiĝi nur en la tutmondo.

La ribela fajrero el Petrogrado nepre devos trapasi la tutan mondon, ĉiujn kontinentojn kaj alkonduki al plena triumfo de la laboro liberigita kaj de la homaro senkatenigita.

Ne forgesante pri la laboro farota kaj la vojo ankoraŭ trapasota, ni povas je fino de la kvina jaro rerigardi la pasinton, noti la lumajn kaj mallumajn momentojn de la pasinto, ĉerpi el la pasinto instruon por la estonto kaj forton por novaj bataloj kaj venkoj.

Sovetlandaj Esperantistoj, partoprenintaj dum tiuj jaroj la defendon de la lando, partoprenintaj en ĝiaj suferoj kaj venkoj, honoras la pasintan

kvinjaron per eldono de la libreto, kiu povus servi kiel valora memoraĵo por la aktivaj kunbatalantoj de la unua kvinjaro Sovetlanda, kaj por eksterlandaj niaj samideanoj,—kiel mallonga skizo pri la pasinto de Sovetlandoj.


Artistan memoran artikolon de k-do L. Sosnovski, unu el la plej meritaj ĵurnalistoj Sovetlandaj—ni prezentas en la talenta traduko de nia samideano V. Polakov.

Centra Komitato de Sovetlanda Esperantista Unuiĝo, eldonante tiun verketon por la profito de la malsatantaj infanoj sovetlandaj, esperas apogon kaj subtenon de la eksterlanda samideanaro.

E. Drezen.

Prezidanto de C. K. de S. E. U.

Moskvo. Kremlo.
1/II—23.





Kvin jaroj.

Foje kun kelkaj kamaradoj ni trafis okaze al baletto «La Ĝibĉevalet'». La baletto, kiel ĉia baletto. Sufiĉe malsaĝa, sufiĉe sengusta kaj absurda.

Al mi kliniĝis unu el la kamaradoj (homo kun la nom', konata al tuta Rusio) kaj, ne deŝirante la rigardon de la scenejo, li ekmurmuris kun ruza, gaja rideto:

— Vi scias, la prezentado ja pri ni temas!..

— Pri kiu—pri ni?

— Pri la bolŝevikoj. Atentu—Ivan-Malsaĝulo renversas ĉiujn barojn, eliras kiel venkinto el ĉiuj malfacilaĵoj kaj fin-fine ĉirkaŭ li en ĝoja danco kunvenas ĉiaj popoloj. Eĉ en kaldrono kun bolaĵo li estis, kaj sendifekte. Tia li belul' aperis, ke estas eble nek rakonti en fabel', nek priskribi per la plum'. Sed kiam la maljuna caro ekvolis, laŭ ekzemplo de Ivaĉjo, alinaskiĝi, kaj sinĵetis en la bolantan kaldronon—tie venis al li fino. Li kuirigis. Ne, kia alegorio? A?

La alegorio efektive ne malbona estas.

«El tri filoj de la avo
La unua—saĝa, brava;
Iom, iom—mezaĝul',
Juna—tute malsaĝul'.»

Ameriko, Eŭropo kaj... Rusio, bolŝevika Rusio, Rusio de analfabetaj muĝikoj kaj malkleraj laboristoj.

Saltas, sin portas tra montoj kaj valoj «la ĝibĉevaleto»—la Revoluci'. Ĉiuj ĝin sentas. Ankoraŭ antaŭ 75 jaroj estis dirite:

— Vagas tra Eŭrop' fantomo, ruĝfantom' de l'komunismo.

Nun ĝi estas jam ne senkorpa silenta fantomo, senbrue sinmovanta tra Eŭropo.

En tondro kaj ŝtormo flugadas la Revolucio super la mondo. Bruego de ĝia marŝado skuas la Malnovan kaj Novan Mondon—Eŭropon kaj Amerikon. Ĝian fajran spiradon sentas la popoloj de Azio kaj Afriko, Oriento Proksima kaj Ekstrema.

Alte super la tero sin portas, ŝvebas la fajra mirinda ĉeval'. La homaro etendas al ĝi la brakojn, alfiksas la rigardojn. Unuj kun petego kaj espero, aliaj en tremo kaj timo.

Kaj nur al la simplulo Ivaĉjo-Malsaĝa prosperis kapti la mirindan ĉevaleton, surrampi ĝin kaj, alkröĉiĝinte la kolhararon, sinpremante al la ĝibo, suprenflugi ĝisnube kaj komenci kortimigan kuradon tra montoj kaj valoj.

Supren—mal-, leviĝo—fal'... Spiro mankas al Ivaĉjo. Jen-jen li altiĝas al suproj mem:

— Hej, saluton, lun-lunido!

— Mi Ivaĉjo Petro-ido...

Li senceremonie parolas kun la suno kaj luno, kaj la stelojn eĉ klin-saluti ne havas tempon...

Ankoraŭ pli fikse kaj streĉite oni observas sur la tero flugadon de la ĝibĉevaleto kaj ĝia rajdanto...

— Ĉu li falos... Aĥ, ke li sintenu!..


— Ĉu li sintenos... Aĥ, ke li falu...

Malfortiĝas la manoj ĉe la bravulo... Kaj la ĉevalo iafoje malsupren-flugas altere, malplirapidigas furiozan kuradon...

— Li falas, falas, tuj frakasiĝos,—ĝojegas unuj.

— Sintenas li... Ankoraŭ li kuregas antaŭen... Kiel pala li estas... Vin tenu, Ivaĉjo, karulo... Ni baldaŭ vin sekvos...

Sorĉadas sorĉistinoj... Senmorta skeletulo gardas ŝlosilojn de la feliĉo. Sur fundon de la ocean-marŝo malleviĝas Ivaĉjo, trabaraktas netraireblajn densaĵojn. Ĉiam antaŭen kaj pli supren...



La domo de la Laborist-Kampanara registaro en Kremlo (VCIK).

La ŝlosiloj de la feliĉo estas trovitaj... La trekara pordego estos malfermita por ĉiuj suferantoj kaj premitoj. Tra la bolantaj kaldronoj de neaŭditaj suferoj trairos la homaro kaj elvenos renovigita, renaskita. «Nek rakonti en fabel', nek priskribi per la plum'». Kaj la malnova mondo forbrulos, cindriĝos en la fajro, kiun ĝi mem bruligis.

* *
*

Sed ankoraŭ longa estas la vojo. Ankoraŭ ne ĉiuj spertoj estas traitritaj. Kurado de la revolucio estas ŝirmova kaj neegala. La rajdanto firme sintenas. Li, ŝajne, kunfluiĝis kun la ĉevalo. La popolo kaj la revolucio—ĉu tio ne estas la samo? Rusio kaj la Revoluci'—ĉu tio ne estas la samo?

La furioza saltkurado daŭras... Pro piedfrapado tremegas la tero...

Sed se ankoraŭ ne estas vid ta antaŭe la fino—ĉu ni ne povas rigardi returnen, al la komenco mem? Ĉu multon trakuregis ni, ĉu malproksimen ni forveturis?

Retrorigardu ni... Nur por minuto, ke la kapo ne ektorniĝu kaj la manoj ne malfortiĝu... Ah, kiel malproksimen ni forflugis... Ĉu estas la samaj manoj, kiuj per malfirmaj movoj alkroĉiĝis la kolhararon? Ĉu estas la sama rajdanto, kiu ĝibuminte alpremiĝadis al la ĉevalo? Tiu, sed ne tiu sama...

Rigardu, kiel li rektiĝis, kiel certe-firmaj estas liaj manoj, kiel firma estas lia rigardo, fiksita antaŭen, tra nuboj kaj nebuloj. Li komencas gvidi la ĉevalon. Li studekkonis kutimaĵojn kaj movojn de la ĉevalo, ĝian spiradon, tondron de ĝia bleko...

Nun por ĉiuj sur la tero estas videble, ke la rajdanto fintenos sin, ĝiskuregos... Jam provas forton de siaj muskoloj kaj nervoj aliaj, dezi-rantaj leviĝi kun li sur la Ĝibĉevaleto.

Ne danĝeras—la ĉevalo estas bona, ĝi elportos ĉiujn, kiuj nur surram-pas ĝin kun firma volo: perej aŭ ĝisiri la finon.

Do, retrorigardu ni...

* *
*

Kio aperetas jen-tie tra aŭtuna oktobra nebul'?. Ĝi estas Piter... La Granda urb-ribelinto... Severaspekta Vintra Palaco el maldensiĝanta nebulo minacas per pugno al Smolnij. En la Maria palaco kunsidas la



M. I. Kalinin.
Prezidanto de Tutruslanda Ekzekutiva
Komitato de Sovetoj.

komanda etato de dronanta malnova Rusio... Antaŭparlamento. Paroladoj, rezolucioj, korektoj, deklaracioj, gestoj, aplaŭdoj.

Kaj en la kularoj—malbonprofeta murmuro, fragmentoj de la panikaj frazoj:

— Ĉu vi aŭdis: oni diras, ili prepariĝas... deziras elpaŝi proksimtage.

— Bolŝevikoj?... Jes, jes... Mi aŭdis... Ĝi estas frenezo... Sed ili estos izolitaj... Ilin subtenos nek unu partio, nek unu socia grupo... Solaj kontraŭ ĉiuj—tio estas frenezo...

— Jes, sed... la ŝipanoj, vi aŭdis? Kaj poste la soldatoj... Ĉu vi legis rezoluciojn de la norda regiona kongreso—tio jam estas insurekcio, ribelo...

— Kaj la parolado de Trocki en la Popola Domo... Oni diras, ke li sin tenis, kiel mastro de la momento...

— Je kio ili esperas?... Kie ĉe ili estas la homoj, kapablaj regi tian landon? Ĉu plumbsigelita Lenin?—La teoriisto kaj fanatikulo, forge-sinta dum la elmigrado eĉ la propran lingvon.

— Kaj aliu?... Nur suspektindaj personoj...

— Tss... silentu, sinjoroj... Kerenski komencis paroli...

... — kaj mi deklaras en la nomo de Provizora Revolucia Registaro, ke la krima bando estos senindulge dispremita, se ĝi kuraĝos nur elpaŝi.. («brave, brave»...). Jes, senindulge!.. Ĉiuj necesaj rimedoj estas jam prizorgitaj (brua ovacio).

* *
*

En tria etaĝo de Smolnij ne laciĝante krakadas telefon-sonoriloj. Rapidiras zorgmienaj homoj tra fumplenaj, tutkraĉitaj koridoroj. El kazernoj, el uzinoj, el ŝipoj, el frontoj iras per densaj ondoj la ĝojaj informoj. Ĉiuj estas pretaj. Oni atendas nur la ordonon. Por la malamiko restas preskaŭ nenia reala forto. Eĉ ne la kozakoj. Kvazaŭ en farso, al la registaro restis fidela nur unu armeero—la virina atakbataliono, operet-maskobala amaso da senprudentigitaj virinaĉoj.

La milit-revolucia komitato kunsidas. La nervoj estas streĉitaj, kiel muzik-kordoj. Estas tempo fini. Jam transmigris en Smolnij'n iu maljunuleto en peruko kaj okulvitroj: Lenin. Tie ĉi estas ankaŭ Zinovjev. Estas jam tempo fini. Ĉio—preta. Nur premi butonon kaj... turniĝos nova paĝo de la tutmonda historio...



K-do Kalinin en sia naskovilaĝo partoprenas la kunvenon
vilaĝanan.

Estas farite. Oni premis. Ekpafo de la «Aŭroro» al la Vintra Palaco... Oni elkondukas el la palaco la konsternitajn ministrojn de Kerenski... En la Petropaŭlan fortikaĵon... Survoje subitaj pafoj... Sinjoroj ministroj tuj kune faldronas perventre kaj vizaĝe en aŭtunan malpuraĵon de pavimoj... Poste ili leviĝas malpurigitaj, fikompatindaj, mizeraj...

— Eĥ, se fojon nur kolfrapi tiun kanajlaron, —bedaŭregas soldato, —mi al ili montras la militon «ĝis plena venko»...

En la Petropaŭla fortikaĵo Antonov-Ovsèjenko aranĝas kontrol-elvokon de la «civitanoj—eksministroj»...

— Subskribu, mi petas... Jen ĉi tie, sur la folio... Aĥ, kia intereseĝa dokumento por muzeo, —admiras Antonov-Ovsèjenko.

* *
*

Sinjoroj ambasadoroj kaj diplomatoj de grandaj, mezgradaj kaj malgrandaj ŝtatoj kunvenadis en unu salono sur Morskaja strato kaj interkonsiliĝis ĉe matenmanĝo:

— Vian opinion pri ĉi tiu sovaĝa historio?.. Kiel ni devas reagi?

— Mi opinias: neniel. *Simple ne rimarki*. Ĉio ja finiĝos post kelkaj tagoj.

— Tute vere... Kun ĉiu tago ili estos pli kaj pli izolitaj... Ĉu vi legis liston de la organizaĵoj, aliĝintaj al la Komitato por savado de la patrujo kaj revolucio?

— Jes, jes... Eĉ socialistoj. Definitive ĉiuj.

— Ne, sinjoroj, vi aŭskultu: kion Trocki faris? Li venis en la ministrejon por eksterlandaj aferoj kaj deklaris sin ministro. Kiele? Trocki kaj diplomatio? Ĥa-ĥa-ĥa. Nu, certe, ĉiuj oficistoj dorsturniĝis al li kaj ŝajnis, ke ili ne rimarkis la kuriozan agaĉon de tiu ĉi... ĥa-ĥa-ĥa, ministro...

— Ĥa - ĥa - ĥa... Kiele — stranga ministro por eksterlandaj aferoj?...

* *
*

Forsonis pafoj ĉe junkraj militlernejoj apud Gatĉina. Sapveziko de la provizora registaro krevis. Rusio estas trafulmita per energio de la ribelado.



Kalinin en la Volga regiono dum la malsato 1921.



Kalinin apud la batal-linioj.

Komenciĝas saltado kaj skuado sur vojkavoj de la revolucio. Krasnov... Ukraina parlamento... Germanoj... Kaledin.. Germanoj kaj ree germanoj.

Noktaj fajfadoj de uzinoj. Kolektiĝo de volontuloj en Smolnij. Okcidenten, al Pskov! «Luparo», «Agla nesto»—anstataŭ numeroj de regimento, divizio, armeo.

Ni estas venkitaj. Ni subskribis la pac-kontrakton. Febro en la partio. Maldekstruma komunismo. Ribelo de la maldekstrumaj es-eroj. La buboj, uzurpintaj por duonhora la telegrafon, ordonas al Rusio ne obei la ordonojn de forigitaj Sverdlov kaj Lenin. Kvazaŭ gimnazianoj, forkurintaj de la paĉjo kaj panjo en Afrikon, ĉasadi elefantojn kaj krokodilojn kun tranĉileto en la poŝo.

Ridinde kaj malĝoje. La germanoj post la mortigo de Mirbaĥ postulas, kiel garantion, enlason en Moskvon de 1000 germanaj soldatoj. Rifuzi? Kaj, eble, ili komencos atakadon. Konsenti? Sed tio signifas mortriskigi la junan potencon.

En salono de «Metropolo» kunsidas VCIK. Malsana, malvarmuminta, trolacigita Lenin, penigante sin, legas laŭ papero la respondon de Sovnarkom al la postulo de la germanoj: *rifuzi*.

Sendebate VCIK aprobas la rifuzon. Ŝajne, en tiu sama kunsido Sverdlov «interalie» komunikas pri ekzekuto de la caro Nikolao. «Enprotokoligi». Oni komparu kun la drameca batalo de la partioj ĉirkaŭ la kapo de l'detronigita reĝo en la epoko de l'granda franca revolucio. Tie estis paroladoj, deputacioj, juĝado, konvento. Ĉi tie — «enprotokoligi».

Kaj poste—kavo post kavo. Perfido de komandanto Muravjov en Simbirsk. Perdo de tuta Volgo, Siberio.

Mi memoras la ordonon de Trocki—«Dispremu la abomenulon!» La konstituantoj. Direktorio. Kolĉak. En la Sudo malprosperas. Ĝemas Ukrainio. Kun batalo retiriĝas al Caricin la heroecaj laboristoj de Donec-baseno. Artem. Vorŝilov. Rakovski diras plej mirindajn diplomatajn parolaĵojn dum la traktado kun la diplomatoj de Skoropadski. Manuilski apenaŭ sin regas, por ne rideksplodi, por ne fari amuzigan grimacon, ne ŝercimiti la «altestimatan prezidanton de la ukraina delegitaro».

Kaj aliaj—la komunistoj, en tiu ĉi tempo organizadis insurekcion en Ukrainio, maldisciplinigis la armeon de Vilhelmo.



Kalinin en la Volga regiono dum la malsato 1921.

Ne grave, ne grave! La diplomatoj de Skoropadski prezentu novan landkarton de la hetmana Ukrainio, kie la orienta limo alŝoviĝas preskaŭ al Caricin kaj Astraĥan. Rakovski diros ankoraŭ 10 trihorajn parolaĵojn. Kaj la talpo fosas kavon por Skoropadski kaj por liaj altrangaj favorantoj en la kaskoj.

9 Novembro 1918. En splitojn kaj polvon estas transformita la monarĥio de Vilhelmo. De nia kolo deglitis la maŝo. Ebriaj horoj, kapturnaj minutoj. En Germanio—Sovetoj. Radiotelegramoj de Karlo Libkneĥt.

En la Granda teatro iu koncert-mitingo. La scenejon okupas orkestro. Inter seĝoj kaj pupitroj sin traŝovas Iljiĉ. Li moderige parolas pri la germanaj okazintaĵoj. Sed el-post kulisoj kvazaŭ sur risortoj elsaltas Buĥarin. En liaj manoj estas freŝaj radiogramoj. Lastaj novaĵoj. Vere malfacile estas ekkredi. La salono de la Granda teatro bolbruas, kiel kaldrono. Kiaj vizaĝoj, kiaj okuloj! Jen ĝi estas la helpo el Okcidento! Fariĝas...

Kaj denove premantaj labortagoj. Batalfrontoj. Malsato. Mortigo de Libkneĥt kaj Rozo Luksemburg. Ioffe estas ekzilita de la socialdemokratia registaro el Germanio. Kvazaŭ peza ŝtono kuŝiĝas ĉi tiuj informoj sur la flamigitajn animojn. Interne la severega Ĉeka (Eksterordinara komisiono por batalo kontraŭ banditismo, kontraŭ-revolucio kaj spekulado) malkaŝas konspiron post konspiro kaj frakasas mala mikojn de la revolucio.

Mi ricevis en ĈK taglibron de ekscelenca princo Obolenski. Ĝi estas komencita la 25 Oktobro 1917.

La brila gvardia kolonelo tagon post tago notas en la kajero la impresojn kaj okazintaĵojn de la unua jaro de la revolucio. Komence li ne rimarkas la revolucion. En kompanio kun Lokkart, generalo Pul kaj ceteraj agentoj de Antanto (Entente) li ĝuvivas en Petrogrado. Poste fariĝas ĉiam pli malbone, sed... ne grave. Per korupto de la ofikantoj li reakiras el ferkaso en la banko de Ĝamgarov ĉiujn familiajn trezorojn. «Pendvestitaj de-pied-al-kape per brilantoj, ni eliris el la banko kaj ferve dipreĝis en templo». En la bieno de princo Obolenski la vilaĝanoj ankoraŭ klinas la kapojn antaŭ la «ekscelenca moŝto». Sed nubegoj densiĝas. Alvenas fatala tago de registrado de oficiroj en la Aleksea lernejo. La princo komencas «lupan», eksterleĝan vivadon. En



A. S. Jenukidze.

**Sekretario de la Centra Ekzekutiva Komitato
de Unuiĝo de Sov. Soc. Respublikoj.**

laborista bluzo li vagadas, kiel ĉaslacigita besto, serĉante sendanĝeran azilon. Vane. Ĉiuj liaj amikoj, same kiel li, estas ligitaj kun la kontraŭ-revolucio kaj tial vivas, kvazaŭ sur vulkano. Per konvulsia skribo li notas lastajn liniojn de la taglibro kaj finas per la maltrankvila demando: «kion preparas la morgaŭo?» La princon ne savas la blua bluzo. De la okuloj de ĈK ĝi ne kaŝis lin.

Kaj kiom da ĝojegaj linioj skribis la princo en la taglibron, kiam estis vundita Lenin, mortigitaj estis Uricki kaj Volodarski! Ili ĝojegis. Kaj ni? Kiu el ni forgesis tiujn tagojn?!

Mi memoras la unuan datrevenon de la Revolucio. Vespere, renkontiĝinte kun V. I. Lenin apud la templo de Jesuo Savanto, ni kune veturis al la regionoj. Sur la stratoj estis malfacile moviĝi en aŭtomobilo tra la amasoj. Oni rekonadis Lenin, kriis «hura», aplaŭdis, sintiris al la maŝino por pli proksime rigardi la karajn trajtojn de la gvidanto. Post paro da minutoj ni estis en la uzino de Miĥelson. Neniu atendis Iljiĉ'on. Estis duonmallume, kaj kiam, trabaraktinte antaŭen, sur la tribuno aperis subite Lenin, la amaso kvazaŭ tetaniĝis. Li ree estas ĉi tie, nia Iljiĉ!! Ĉi tie, apud pordego de tiu ĉi sama uzino la malnobla mano paf-faligis la giganton de la penso kaj faro. Kaj jen, apenaŭ resaniĝinte de la vundo, li ree estas ĉi tie kun la amasoj. La virinoj ne povas sin regi de larmoj kaj per la malsekaj okuloj ili observas ĉiun geston de la oratoro. Kaj li diras ne festan parolaĵon. La batalo estas antaŭe. La batalo estas plena de malfacilaĵoj, postulas oferojn. Multon da oferoj.

Mobilizoj sekvas post mobilizoj. La partio, profesiaj unuiĝoj, sovetoj, uzinoj — ĉiuj ĵetas al militfrontoj la plej bonajn kamaradojn. Sed ankaŭ en la malfronto oni ne dormas. Malriĉularo «elbatas bazon» el-sub vilaĝaj premriĉuloj.

En la urboj per mallertaj movoj la laboristoj komencas administri fabrikojn kaj uzinojn. Ĉio estas naciigata. Ampleksa plinombriĝo de kluboj, universitatoj, muzeoj, artstudejoj, infandomoj, infanvartejoj. En la vilaĝo embriiĝo kaj evoluo de komunumoj. Kreskas la Ligo de l' komunista junularo. Grandampleksa fariĝas la movado de la virinoj-laboristinoj, gvidata de la virin-fakoj. Tiu ĉi movado altiras al socia kaj politika vivo grandegan rondon de la homoj, ĝis tiam ankoraŭ ne vivintaj. La partio kun eksterordinara energio gvidas agitlaboron en



L. D. Trocki.

Popola Komisario por la milit-kaj mar-aferoj.
Prezidanto de la Revolucia Milit-Komitato
Respublika.

la amasoj. Ju pli malfavora estas ĝenerala stato, des pli proksime al la amasoj la partio celas ekesti.

Sed la malsato, malsato!.. Kiu ne memoras la teruran panon kun lignaj splitoj, ŝeloj kaj diablo scias kun kio ankoraŭ. Tiu ĉi pano kaŭzis vundojn al stomako kaj tia pano iafoje mankis dum tagoj kaj semajnoj.

En la somero de 1919 jaro la landkarto de Soveta Rusio prezentis nur la distrikton de antikva Moskovio—la centran regionon.

— Pereis Rusujo...—siblis kolerigitaj inteligentuloj.

La diplomaciaj notoj, kiujn dissendadis Ĝiĉerin kun la protesto kontraŭ mastrumado de la internaciaj rabistoj sur la rusa teritorio, ŝajnis mizeraj al tiuj, kiuj estas pretaj kliniĝi antaŭ boto de konkerinto.

La unua packontrakto kun Estonio kaj orpago al ĝi «por malprofitoj», ŝajnis signoj de l'granda malforto. La konstantaj certigoj pri nia pacamo kvazaŭ instigis la rabistojn ataki la tiom pacajn najbarojn. Neniu volis kompreni, ke la heroecaj amasoj, kapablaj pereji sur la batalfrontoj pro la revolucio, samtempe avidas la pacon.

Fine, rimarkiĝis la krizo. Ektremis la orienta fronto. Kazan', Simbirsk', Samaro, Ufa', Perm, Ekaterinburg'—la teritorio de Volgo ĝis Urala montspino estas liberigita per la ruĝaj armeoj for de la blankuloj. La armeo elstudis arton venki. La uralaj laboristoj revenis al siaj uzinoj. Apenaŭ ili komencis restarigi la mastrumadon, kiam estis necese ekiri de Uralo por helpo al la suda fronto, kaj tuj baldaŭ ankaŭ al la okcidenta, kontraŭ la polaj sinjoroj.

Ektremis ankaŭ la suda fronto. En vintro de 1919—20 jaro estis tutvenkita Denikin. Ukrainio estis liberigita. Nur en Krimeo restas splito, laŭnome Vrangell. Ektondris la Perekopaj bataloj kaj Krimeo estas purigita for de la blankuloj. Poste sekvis la venkoj kaj malvenkoj sur la pola fronto kaj, fine, la paco.

Ĉiam pli larĝe dismoviĝas la limoj de Soveta Federacio. Krevis la menjŝevika regado en Gruzio. Tuta Kaŭkazo fariĝis soveta. Estas purigita for de la blankuloj tuta Turkestano. Buĥara emiro falis kaj super Buĥaro ekflirtis la ruĝa soveta standardo.

Nur en Ekstrema Oriento restadis flokoj de la japan-blankgvardiaj fortoj, kiuj baris al ni aliron al Pacifika oceano.

Komenciĝis traktadoj kun la burĝaj regnoj. Aperis unuaj komercaj kontraktoj. En la ĉefurboj de Anglio, Italio, Aŭstrio, Ĉeĥo-Slovakio,



Sur la Ruĝa placo en Moskvo.
Trocki antaŭ la ruĝarmeaj taĉmentoj.

Germanio, Svedio, Norvegio, Kanado, Ĉinio, Persio, Polio, Finnlando, Latvio, Estonio, Letonio, Turkio aperis reprezentantoj de RSFSR.

Eĉ ne alirebla Francio permesis ĉeestadon en Parizo al la reprezentantoj de RSFSR sub la ŝildo de kooperacio (ni rememoru, ke ankaŭ Krasin unuafoje aperis en Anglio, kiel delegito de la kooperacia Centra Ligo).

La voĉoj de la rusaj reprezentantoj firme trasonis dum la internaciaj konferencoj en Genovo kaj Hago. Decidplenaj kaj firmaj estis alparoloj de la rusia delegito k-do Ioffe dum la traktado kun Japanio. Kunfaldis la pakajojn kaj forigis bonfarte el Siberio la japanoj, kiuj mastrumis en la Ekstrema Oriento de 1918, de la tempo de l'es-era ribelo.

Kaj jen estas malpligrandigita la armeo. Forliberigitaj estas hejmen la maljunaj batalintoj de la armeo kaj militŝiparo. En la kazerno kaj sur ŝipoj restis nura junularo. En la kursoj kaj en lernejoj estas forĝata nova komanda etato. Ĉirkaŭ 70% de ĉiuj komandantoj en Ruĝa armeo konsistas el la laboristoj kaj vilaĝanoj. La armeon filigas la proletariaro. Ĉiu regimento, ĉiu militista fako havas sian kuratoron-ĉefon en persono de uzino, profesia unuiĝo aŭ Soveto, kiuj prizorgas moralan kaj materialan helpon por la ruĝaj batalantoj.

Sur novaj frontoj komencis malvolviĝi la fortoj de la revolucio. Popolmastrumado kaj kulturo. Ankaŭ tie ĉi en la komenco estis grandaj malvenkoj.

Malbonrikolto, kaj poste malsato sur la kampoj de la respubliko. Konsumiĝo de la vilaĝana mastrumo. Atako de malutilaj insektoj kaj bestoj. Malpliampleksigo de semado, malboniĝo de rikolto, semĉesigo de la plej valoraj kulturaĵoj—lino, hordeo, kotono kaj ceteraj.

En la industrio—mortminaca malsano de la transporto. Apenaŭ spiranta Uralo, senforte sin etendinta Donec-baseno, malrapide resaniĝanta nafto. Mortaj marhavenoj, dezertaj vastaĵoj de la grandaj riveroj. En febro pulsanta teks-industrio.

Ruiniĝanta ekstere kaj interne la popola lernejo, frostantaj lernantoj, malsatantaj instruistoj. Mankas kraĵonoj, libroj, kajeroj.

La Universitato, en posedo de burĝaj profesoroj. Studentaro el burĝ-demokratia medio. Strikoj de la profesoroj, mokado de la instruituloj pri «la rampantaj» en scienctemplojn malpuraj «kuiristinaj infanoj».



Sur la Ruĝa placo en Moskvo. La ruĝarmeaj taĉmentoj trapasas antaŭ Trocki.

Frapo post frapo sur la frontoj de la popolmastrumado kaj kulturo. La revolucio manovras, fiksfirmiĝas sur la pozicioj kaj komencas moviĝi antaŭen.

Per superhomaj penadoj, per komuna solidareco de la laborantoj estas tutsemitaj la kampoj, forbruligitaj antaŭe de la senkompata suno. La tutaj regionoj (centraj kaj parto de nordaj gubernioj) montras kreskadon de la sursemata areo kaj proksimiĝon al la antaŭmilita areo. En granda amplekso estas praktikataj plibonigitaj metodoj de la agrikulturo, garantiantaj pliboniĝon de la rikolto. Al la batalo kontraŭ malutilantaj insektoj kaj bestoj oni eliras, kiel sur la fronton, kun sufokaj gasoj, aviadiloj, inĝeniertaĉmentoj. Restarigata estas la viva kaj malviva inventaro.

Proletariaj kaj modelaj sovetaj mastrumorganizaĵoj portas sian sperton en la amasojn. Estas ekfunkciigitaj sem-kaj bestkulturigaj mastrumoj.

Vigliĝas la industrio. Rapide, kvazaŭ en fabelo, renaskiĝis Petrograda haveno. Pliboniĝas laŭgrade la transporto, jam plenumanta la plej gravajn taskojn. Pli prosperas nafto, torfo, kaŭĉuko, teks-industrio kaj alio.

El-sub la tero elkreskis la elektro-stacioj: Kaŝira, Satura, Utkina zavodj. Estas konstruata Volĥova. Estas intencata konstruado de la liaj, envicaj.

Aperis novaj fakoj de la popolmastrumado, kiel ekz., ardeza, kolumna. Estas praktikata nova metodo de torf-akirado—hidrotorfo. Altniveliĝas akirado de apudmoskva ŝtonkarbo. Pliperfektigatas la manieroj de hejtaĵ-bruligo.

La lando estas kovrita per reto de radiostacioj. La reto plivastiĝas de tago al tago. Estas pliperfektigata radiotelefonio.

Ne ĉesiĝis serĉadoj kaj esploroj de novaj naturaj riĉaĵoj. En vico estas malkovro de la plej riĉaj kaj raraj laŭ la kvalito ferminaĵoj en kurska gubernio. En laboratorioj kaj specialaj institutoj fidele kaj honeste laboras la plej bonaj el la scienculoj. Fondiĝas mirinde aranĝita kemia instituto je la nomo de Karpov kun la celo evoluigi nian kemian industrion. Unu el la venkoj de la kemio estas farboj de prof. Turkin, kiuj alportas revolucion en presan, teksan, tapetan k. t. p. aferojn.



K-do Budjoni.
Komandanto de la ruĝa kavalerio.

En la kulturfako—la batalo nur malvolviĝas. Unuaj taĉmentoj de la junaj proletarioj enpenetris la universitatojn, la rezervoj estas preparataj en la laboristaj fakultatoj. Dekmiloj da lernejoj de fabrikuzina studado preparas novajn lertajn laboristojn. Estas ĉesigata ruiniĝo de la elementa lernejo. Estas aranĝita grandkvanta emisio de lernolibroj kaj helpiloj. Eldona afero bone disfloris.

Malgrandaj estas niaj sukcesoj en teatra, belarta sfero

Sed la revolucio donis frakasan baton al la apogilo de malklereco kaj spirita premo—la eklezio. La eklezio konvulsias en skismoj. Ĝiaj gvidantoj malhonoras unu la alian, kreas novajn grupojn kaj frakciojn, en la paroloj rampas antaŭ la malpia revolucio.


Komenciĝis ankaŭ plisaniĝo de l'vivaranĝo. Renaskiĝas, renoviĝas la urboj, ili kuracas la vundojn, plibeliĝas, sin purigas, komencas ampleksan konstruadon. El loĝejoj de la laboristoj foriras la tedintaj gastoj—malsato kaj malvarmo. Estas forgesitaj frostdifektitaj, duonfluidaj terpomoj, kiujn kun malbenoj portadis sur sia ĝibo la proletarioj. En vico estas organizo de kreditiga provizado de la laboristoj je vestoj kaj meblaro. La laboristoj pliintensigis la batalon sur loĝeja fronto kaj faras kelkajn sukcesojn.

Kaj kiel nigra nubego, kiel eterna minaca memorigilo, staras antaŭ la laboristoj NEP (Nova ekonomia politiko) — najbareco de la kapitalismo, etendanta la manegojn al la akiraĵoj de la revolucio. Koncesioj, bankoj, magazenoj, akciaj societoj, borsoj, kambioj, pruntoj, manĝegdelikataĵ-magazenoj, kafejoj kaj kabaredoj, vino kaj ludkartoj — tiu ĉi vizaĝo de la malnova mondo konstante memorigas, ke la batalo ne estas finita, ke la antaŭaj pozicioj estas tute proksime de ni, ĉirkaŭ ni. La batalo ne malstreĉiĝas. Ŝanĝiĝas armiloj kaj strategio.

Por la sekvonta atako, por decidiga frapo ni bezonas alvenon de la rezervoj. La rezervoj formiĝas, studas batalon kaj baldaŭ kuniĝos kun ni en unu ĉenon.

Ni komencis solaj. La rezervoj tiam ne estis vidataj. Ni kredis, ke la rezervoj devos veni. Ili iras.

En la kvinjara datreveno ni ekvidos paradon de niaj rezervaj fortoj. Mankas tia terloko, kie por helpo al ni ne prepariĝus la batalrezervoj.



La atako de la Vintra palaco en Petrogrado.

Venos la tago, kiam la kapitalista cirklo ĉirkaŭ ni estos same traŝirita, kiel estis traŝirita la blokado kaj cirklo de la batalfrontoj. Tiam kurado de la revolucio finiĝos ĉe la dezirata celo.

Kaj dume—la vojo estas ankoraŭ longa. Tra montoj kaj valoj, tra maroj kaj riveroj, tra malvenkoj kaj venkoj ni kuregas antaŭen. Kaj rigardinte returnen trans kvin jaroj, ni vidas: multon ni travivis, sed kiel malproksime ankoraŭ estas ĝis la plena kaj finfina venko. Ni laboros, batalos kaj ni atingos la deziratan celon: la surteran realiĝon de la vera feliĉo kaj frateco por la popoloj, liberigitaĵ for de la kapitalismo.





La armitaj laboristoj sur la stratoj Petrogradaj en Oktobro 1917.

Klarigaj notoj.

„*La Ĝibĉevaleta*“ — rusa fabelo, prilaborita de poeto Jeršov. Ĝi temas pri mirinda ĝibĉevaleta, dank'al kiu Ivan-Malsaĝulo fine fariĝas reĝo kaj edziĝas je ĉarma reĝidino. Laŭ la fabelo komponisto Puni verkis muzikon por samnoma baleta. (La fabelo estas verse tradukita en Esperanton de Romano Frenkel. La traduko troviĝas ĉe la Rusa Sekcio de E. L. A.)

Ivan-Malsaĝulo — en rusaj fabeloj ofte renkontata persono.

Piter — popola nomo de Peterburgo.

Vintra Palaco — apud la bordo de Nevà-rivero, la sidejo de Provizora Registaro. Antaŭa Peterburga restadejo de la caroj, konstruita de fama Rastrelli.

Smolnij — iama instituto por la knabinoj el artistokrataj familioj. En la 1917 jaro sidejo de la Peterburga Soveto.

La Maria Palaco — sidejo por la Provizora Antaŭ-Parlamento de Rusio (en 1917 jaro).

Komanda Etato de dronanta malnova Rusio — la burĝ-demokratiaj partioj, formintaj la Provizoran Registaron.

Antaŭ-Parlamento — leĝkonsilanta institucio, kreita el reprezentantoj de diversaj burĝdemokratiaj partioj por subteni kaj prifortigi la aŭtoritaton de la Provizora registaro.

Kuluaroj — la apudaj al la kunsida ĉambroj (por interparolo, interkonsiliĝo, fumado k. t. p.)

Plumbsigelita Lenin — Lenin alveturis el Svisio en printempo 1917 en Rusion en plumbsigelita vagono tra Germanio. La Franca Registaro ne permesis lian trapason tra Francio.



La trancheo sur la batalfronto kontraŭ blank-kozakoj 1917.

Maljunuleto en peruko kaj okulvitroj—Lenin, maskita dum aŭtuno 1917 pro persekutoj de la Provizora Registaro.

La „Aŭroro“—militŝipo. Dum oktobraj tagoj de 1917 ĝi staris rekte kontraŭ la Vintra palaco apud la kajo de Neva.

La Petropaŭla fortikaĵo—malnova citadelo sur bordo de Neva, kontraŭ la Vintra palaco. Ĝi troviĝis dum la cara regado politika malliberajo.

Antonov - Ovsejenko — membro de Milit-revolucia komisiono, komandinta la grupojn, atakintajn la Vintran palacon.

Gatčina — apudpeterburga urbeto. La kozakoj, gvidataj de Kerenski, kapitulaciis tie antaŭ la armeo soveta.

Kaledin — Kozaka generalo, ribelinta kontraŭ la soveta registaro.

Maldekstruma komunismo—frakcio maldekstruma de la komunista partio.

La maldekstrumaj es-eroj—frakcio de la socialist-revolucia partio, partopreninta la Oktobran revolucion. En junio 1918 ili ribelis kontraŭ la Soveta registaro.

Mirbaĥ — unua ambasadoro de Germana imperiestro en Moskvo soveta. Li estis mortigita de la maldekstrumaj es-eroj.

„Metropolo“ — antaŭe luksa hotelo, poste dum la 1918 loĝejo de la sovetaj registaraj oficistoj.

VCIK — mallongigita titolo de Tutrusia Centra Ekzekutiva Komitato.

Sovnarkom—mallongigita titolo de la Popolkomisariaro.

Komandanto Muravjov — maldekstruma es-ero, komandinta la orientan Ruĝan armeon, partopreninta la ribelon de maldekstrumaj es-eroj.

*La Konstituant*o — konstituanta kongreso, dispelita de la soveta registaro. En 1918 ĝiaj membroj organizis kontraŭ-sovetan ribelon en Samaro.


Direktorio — la centra organo elektita de la membroj de la Konstituant dum la ribelo 1918.

Kolĉak — admiralo, likvidinta en Siberio la „Direktorion“ kaj proklaminta sin „Ĉefo de Rusio“.

Artem — konata revoluciano.

Voroŝilov — „ „

Manuilski — unu el ĉefaj ukrainaj revolucianoj.



Apud la batal-linioj de la Norda milit-fronto 1919.

La Granda teatro — en Moskvo. Dum gravaj politikaj kunvenoj uzata kiel ilia sidejo.

Iljiĉ — popola nomo de Vladimir Iljiĉ Lenin.

Buĥarin — unu el la plej aktivaj marksistoj-revolucianoj.

Denikin — blankgardia generalo, komandinta la sudajn kontraŭ-revoluciajn armeojn dum 1918—19.


Vrangel — blankgardia generalo, heredinto de Denikin, komandinta la Krimean blankan armeon dum 1920 jaro.

Krasin — popola komisario por eksterlanda komerco, la unua soveta diplomato, trafinta eksterlanden.

Uralo — orienta montspino, limanta kun Siberio, riĉa je [metalminaĵoj kaj potenca industria regiono.

Donec-baseno — plejriĉa en Rusio ŝtonkarba regiono, troviĝanta en la baseno de Donec', enfluanto en la riveron Don'.





Sur la Karelia batal-fronto 1921.


De la Centra Komisiono por likvido de la malsatosekvoj.

Post kolekto de la rikolto en aŭtuno de 1922 evidentiĝis, ke la malsaton, kiel katastrofan masampleksan fenomenon, kia ĝi estis en la periodo de 1921—22, oni povas konsideri forpasinta.

Tamen en apartaj regionoj la loĝantaro ankoraŭ ne ĉesas parte bezoni nutrohelpon. La malsato restigis post si vicon da sekvoj, por kies forigo estas necesa insista, longa laboro, daŭranta dum kelkaj jaroj. Tiuj ĉi sekvoj estas signifa kvanto da vilaĝanaj mastrumoj sen semaĵo, sen bruto (precipe sen laborbruto) kaj sen laboriloj, disvenditaj en la periodo de akuta malsatado; nezorgataj infanoj, perdintaj siajn gepatrojn; forkurintoj de la malsato, bezonantaj signifan materian subtenon ĉe ilia reevakuado kaj instalado en la lokojn de ilia konstanta loĝado; invalidoj de la malsato, postulantaj asekuron. Fine, pligranda inklinemo de la loĝantaro en la malsatintaj regionoj al diversaj malsanoj, kiel rezultato de la skuoj, spertitaj de la organismo.

Krom tio, forpaso de la akuta fazo de la malsato, ree antaŭmetas en la planon kaj ordoneme postulas kontentigon de tiuj grupoj de la loĝantaro, kies interesoj en la periodo de la katastrofa malsatmizero estis malzorgitaj; tio estas la invalidoj kaj forkurintoj de la imperialisma kaj revolucia militoj, la invalidoj de la laboro, senlaboruloj kaj individuaj produktantoj—metiistoj.

Konsiderante ĉiujn ĉi cirkonstancojn, Tutrusia Centra Ekzekutiva Komitato de la Sovetoj organizis la 15-an de oktobro 1922 Cenrtan Ko-




La batalfronto kontraŭ ribelanta Kronŝtadto 1921.


La atakanta Ruĝa armeo sur la glacio.

misionon por likvido de la malsato-sekvoj, kies celo estas kontentigi ĉiujn suprecititajn bezonojn.

Bedaŭrinde, estas necese noti, ke la monprovizo, disponata de tiu ĉi Komisiono, estas multe pli malgranda ol tion postulas la grandiozeco de la taskoj, kiuj staras antaŭ ĝi. La elspezoj de Soveta Registaro, ligitaj kun tiu ĉi helpo, estas grandegaj. Eksterlandaj porhelpaj organizaĵoj kontentigas per sia laboro nur malgrandan procenton de la bezono. Tial aktuala tasko en sfero de la batalo kontraŭ la sekvoj de la malsato estas altiro de maksimumo de la rimedoj per kolektado de monoferoj, kiel interne en Rusio tiel ankaŭ eksterlande. Ĉiuj eksterlandaj organizaĵoj, dezirantaj helpi al la suferintoj de la malsato en Rusio kaj ĝis nun ankorau ne helpantaj, povas havigi la helpon pere de la Rajtigita Reprezentado de la Registaro de RSFSR ĉe ĉiuj eksterlandaj organizaĵoj por la helpo al Rusio (Moskvo, Povarskaja, 44).

Privataj personoj kaj organizaĵoj povas transsendi siajn monoferojn al la Rajtigitoj de la Centra Komisiono por likvido de la malsato-sekvoj en diversaj landoj (al la Rajtigitaj Reprezentantoj de RSFSR en sia lando), kiuj transdonas ilin al la Centra Komisiono por likvido de la malsato-sekvoj ĉe Tutrusia Centra Ekzekutiva Komitato.





La batalfronto kontraŭ ribelanta Kronŝtadto 1921.

La atakanta Ruĝa armeo sur la glacio.

Sovetlanda Esperantista Unuiĝo.

Bazita sur tute aliaj sociklasoj ol en aliaj landoj—la regna sovetsistemo postulas ankaŭ de la movado por la lingvo internacia specialan karakteron kaj specialan aplikon.

La ideologio de sovetismo—postulis de la Sovetlanda Esperantistaro reesploron de la ideologia bazo por la Lingvo Internacia.


Sovetlandaj Esperantistoj estis devigitaj konstati, ke en la lando, ĉirkaŭita de malamikoj, en la lando, defendanta sian rajton akceli memstarajn idealojn, en la lando, kiu celas servi al la premita socio—en tia lando ankaŭ la homama, progresama ideo pri la L. I. devas esti pritraktata nur de la vidpunkto utila kaj praktika por tiu lando, por tiu socio.

Dum la jaroj de terura milito civitana, dum la jaroj de eksterlanda invado la Sovetlanda Esperantistaro, defendante sian patrimon, forĝis novan idearon pri la uzo, pri apliko de la L. I.

Tiu kredo, tiu idearo—jam fariĝis ne nur apartenaĵo de Sovetlandaj Esperantistoj, ĝin jam akceptis pli-malpli grandaj grupetoj kaj gruparoj Esperantistaj en la tuta mondo.

Kaj se ankoraŭ ne ĉiuj, ne la plejmulto akceptas la novajn ideojn de la Esperanto-uzo, la sincera deziro servi al la homaro suferanta kaj premita, al la nacioj sufokataj kaj sufokotaj—nepre devigos la plej sinceran parton de la Esperantistaro almenaŭ ekkompreni la celon de Sovetlandoj starigitan kaj la idealon de ili aspiratan.

Sovetlandoj ekzistas nur unu kvinjaron.



La Ruĝaj militŝipanoj.

La teruraj momentoj de ili travivitaj, la retiriĝo de la aktiva movado de multaj esperantistoj malnovaj, konfuzitaj pro la pseŭdo-partiecigo de Esperanto, manko de la instrumaterialo, manko dum longaj jaroj de internaciaj rilatoj, manko de bone organizita kaj tradicion havanta centro; troa flamiĝemo de junaj kaj novaj Esperantistoj, ne posedantaj la sperton de la malnova batal tantaro—ĉio ĉi ne povis multe sukcesigi la Sovetlandan Esperantistan movadon.

Sed, certe, dum la proksimaj jaroj de paca kaj trankvila rekonstruo de la kultura kaj ekonomia vivo, la Unuiĝo de laborist-kampanaj respublikoj scios kaj povos atenti sufiĉe la grandan valoron de la L. I., kaj finfine kronos la unuigon de la tutmonda popolo en unu socion per komuna ligilo, per komuna interkomprenilo.

Kaj por tiu celo, por pliproksimigi tiun momenton la Sovetlanda Esperantista Unuiĝo uzas sian forton, sian povon kaj sian volon.



aktiva
psüdo-
o dum
j tradi-
ntistoj,
e povis
rekon-
t-kam-
aloron
polaro
landa
n.




G. Zinovjev.

Prezidanto de Petrograda Soveto kaj de la Ekzekutiva
Komitato de la III-a Komunista Internaciano.

Internaciano popola en Moskvo je honoro de la III Kongreso
de Komintern (1921).



Demonstracio popola en Moskvo je honoro de la III Kongreso
de Komintern (1921).



N. Muralov.
Komandanto de Moskva militdistrikto.



Militparado de la Moskva garnizono sur la Ruğa placo.



H. G. Rakovski.

Prezidanto de la Popolkomisario de
Ukraina Soveta Socialista Respubliko.

la revolucia armeo de la Ukraina Soveta Socialista Respubliko



La Soveto.



La Revolucia Oriento. Revolucia manifestado.




G. Ciêrin.

Popolkomisario por la eksteraj aferoj.

Genova Konferenco 1922.



Rudzutak. Ĉiĉerin. Krasin. Litvinov. Ioffe.
Delegitoj de R. S. F. S. R. por la konferenco.



La salono por kunvenoj.

La Revolucia Oriento.



Deputitaro de la virinoj orientaj dum la Kongreso
de la III Komintern.



Demonstracio de la infanoj.



La Revolucia Oriento. Revolucia manifestado.




Revoluciaj manifestadoj en Oriento.

La Revolucia Oriento.



Demonstracio de la studentoj-orientanoj en Moskvo.




Revolucia manifestado en Oriento.



Demonstracio de l'infanoj antaŭ la agit-vagonaro.



Preparado de revoluciaj standardoj.



A. V. Lunačarski.
Popolkomisario por la popolklerigo.
Konata revolucia verkisto.



La infanoj de ĉiuj popoloj faras unu familion.



Infana domo en Sovetrespubliko.



La infanoj dum la tetrinkado.



La infanoj sur la perono de sia domo.



La infanoj dum la laboro.



La infanoj dum la lecionoj.



La infanoj dum la tagmanĝo.



La infano apudvolga—malsana.



La infanoj apudvolgaj en la kolonio por la malsatintoj.




L. B. Kamenev.
Vic-Prezidanto de la Popolkomisariaro
kaj Prezidanto de Moskva Soveto.



La 1-an de Majo en Moskvo. Sur la Ruĝa Placo apud Kremlo.



La sabata komunista laboro volontula.
(Subbotnik).




A. Rikov.


Vic-Prezidanto de la Popolkomisariaro.
Antaŭa Prezidanto de la Supera Komitato
por la Popolmastrumado.



K-do Rikov parolas dum la inaŭguro de la Kaŝira elektro-stacio.



La Satura elektro-stacio.



La ruĝa militŝiparo.



Manifestado en Peterburgo sur la placo de la Martiroj revoluciaj.

La Kovrilo estas desegnita
de la artisto-gravuristo
S. Gruzenberg. La
tuta eldono estas
prizorgita de k-doj
D. Kuzmenko kaj
M. Valentinov.

